



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k102/k102.html>



***Kompatindaj bestoj,
erarigaj politikoj,
malbrila estonto***

N^o 102^a

Januaro 2019

Kajeroj**el la Sudo**

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

**Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia**

Hispanio ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon,
kiun ni trovas interesa kaj kies enhavo
mistraktas neniun personon.

Enhavo

Redaktore: eraroj kaj katastrofo... 3

Kompatindaj bestoj..... 4

La peko de l' taliban', ĉ 9^a.....6

Hispana flamenko.....9

La Faraono, ĉ 51^a.....10

Kovrilo: La Bestista Grupo de Mursjo demonstraciis la 12^{an} de januaro
por defendi la rajtojn de bestojn ne esti senhauĝigitaj aŭ manĝataj.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10
jare por ricevi la surpaperan version de
nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al
kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de
donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi
kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.

Nesubskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.



Redaktore **Politikaj eraroj, evitebla katastrofo**

Nuntempe Hispanio havas du gravajn problemojn: la unua estas la misfaroj de tiu Prezidento, kiun la popolo malpleje elektis. Jes, veras, ke la hispana popolo neniam elektis Prezidenton de la Registaro, sed la liston, kiu PSOE prezentis lastfoje estis la malplej voĉdonita dum la periodo de la tielnomita *hispana demokratio*. Fakte kiam li estis prezidento, li promesis, ke li ekprezidentiĝos nur por organizi novan balotadon. Sed tiu estas mensogo, verŝajne. Li vojaĝas multe, kaj subskribas paktojn, pri kiuj li ne informas nin.

La alia problemo estas misinformado fare de niaj amaskomunikiloj, ĉefe rilate al enmigrado. Ŝajnas, ke estas multe da enmigrintoj, kiuj ne plenumas la postulojn pri enmigrado, kaj aŭtoritatoj scias ĝin, sed ties postenuloj ne kuraĝas plenumi kaj plenumigi la leĝojn, kiujn nia parlamento aprobis. Tio, laŭ mi, estas sensenca kaj memmortiga. Ŝajnas, ke nur en Andaluzio ekzistas pli ol 56000 kontraŭleĝaj enmigrintoj, tio estas, homoj, kiuj ne venis laŭ regulaj kondiĉoj sed kaŝe, kvankam la unuan aferon, kiun ili faras estas peti subvencion de la Registaro Andaluza. Laŭ leĝo, polico devas forpeli ilin el la lando, sed ili ne scias kie ili troviĝas, kvankam la regiona registaro de Andaluzio ja scias, ĉar ili donas al ili monon ĉiumonate pro *homisma kialo*. Politika partio VOX postulas, ke la registaro de Andaluzio diru al polico kie ili troviĝas, por ke polico povu plenumi sian devon, sed aliaj partioj akuzas VOXn kiel *faŝistan* kaj *ksenofoban*. Ŝajnas, ke hodiaŭ postuli, ke leĝon oni plenumu estas iĝi faŝisto... Ĉu oni povas atingi pli altan gradon da sociala stulteco kaj frenezeco? Eble oni opinias, ke Hispanio povas engluti ducent milionojn da afrikanoj... Tio signifas, ke ĉiu hispano devas akcepti ĉe si pli ol kvar dek enmigrintoj, sed mi ne vidas, ke tiuj insultantoj jam akceptis siajn 40...

Ne, male, mi timas, ke Hispanio malaperos kiel lando en la baldaŭa estonto, aŭ ĝi ŝanĝiĝos tiel, kiel oni ne plu konos ĝin. Plej eble ĝi iĝos islamlanda, kaj tiu maniere ni perdos rajtojn civilajn kaj civitanajn tiom dure akiritajn.



Iam araba kvartalo en Mursjo: intencante konstrui parkejon oni malkovris tiujn restaĵojn arabajn. Dum pli ol jardeko oni ne scias, kion fari pri tio.

Kompatindaj bestoj

Hieraŭ mi vidis antaŭ granda magazeno de Mursjo nekutiman spektaklon: kelkaj junuloj kuŝas surplanke kvazaŭ ili estas mortigitaj bestoj, sed knabino vivanta estis en kaĝo. La knaboj portas nur kalsonetojn, dum la knabino portas falsan pelton, ĉar estas tre malvarme (ĉirkaŭ dek gradoj).

Tio ja certigas, ke tiuj gejunuloj estas bravaj kaj dure laboras por siaj ideoj. Demandante poste la blondulinon, kiu direktis la aktivadon, ŝi donis al mi la apudan bildon kun tiu mesaĝo (kiun mi tradukis, evidente).

Verŝajne oni mortigas bestojn por ke ni manĝu ilin poste, kaj ankaŭ por fari peltomantelojn kaj aliajn vestaĵojn. Tion oni faris ekde prahistorio, sed ŝajnas, ke hodiaŭ la teĥniko estas pli doloriga por kompatindaj bestoj. Mi sciis, ke oni mortigas ilin per batado por ne rompi ties haŭton kaj tiel fari plil bonkvalitan pelton. Sed mi devas rekoni, ke mi ne scias pri malhaŭtigado cele al la sama afero. Bedaŭrinde la aktivuloj ne donis al mi multe da informado pri tio. Ili sciu, ke la paĝoj de **Kajeroj el la Sudo** estas malfermaj al ili por diskonigi sian mesaĝon, eĉ se poste aliaj homoj rajtos kontraŭargumenti, se ili devos.

Dum mi spektis ilian faradon kaj aŭskultis iliajn mesaĝojn pere de laŭtparolilo, ili decidis translokigi al enirejo de Hotelo NH, kie okazas ekspozicio pri Peltomanteloj. Mi venis ankaŭ tie, kaj mi vidis, ke tio, kio okazas en la hotelo estas vendado de tiuj vestaĵoj,



Vi ne povas imagi la doloron kaj suferadon, kiun oni trudas kompatindajn kaj senkulpajn bestojn, kiujn oni senhaŭtigas dum ili estas vivaj nur cele al tio, ke vi ostentos vian ridindigan mantelon. Ne uzu pelton.



Porbesta montro en Murcia
antaŭ hotelo.

Ĉu bestoj havas rajtojn?

ne vere ekspozicio. Mendinte kaj trinkante kafon en la ejon de la hotelo, tra fenestro mi vidis ilin veni. Ili estis malpli da homoj, kaj ili aperis tute vestitaj, ĉar vere la tago estis malvarma por Murcia (ĉirkaŭ dek gradoj). Ili kantis kaj kriis siajn sloganojn.

Poste mi trovis ilian paĝon en interreto (hispane verkitan), tra kiu ili informas pri siaj vidpunktoj:

<https://www.facebook.com/grupogarm/>

Eble oni povas pensi, ke ili troigas dirante, ke bestoj estas *niaj gefratoj* kaj ke vivo eblas sen mortigi ilin por provizi nin pri nutrado kaj vestaĵoj. Mi nek konsentas, nek mal-konsentas pri tio, sed mi akceptas, ke tio estas grava afero pripensi. Aliaj homoj diras, ke se oni ne uzus bestojn por iaj ajn celoj, ili ekzistus nur en zoologiaj ĝardenoj kaj ĉe niaj hejmoj kiel maskotoj, ĉar vere homo estas tiom kokurema, ke ne toleras

ekzisto de rivaloj sur la tersurfaco. Mi ne povis ne memori pri Prezidinto Marteno Bustín Benito, kiu ade parolis al mi iam pri tiuj aferoj.

Homo havas grandajn defiojn, kaj fakte la supervivo de homo mem ne estas garantiata sur nia planedo. Estus bone por ni pripensi tiujn aferojn, kaj eltiri siajn proprajn konkludojn.

Unu jaron poste, doninte la manon de filino Sanj', Ibrahim' kaj Zulem' edzinigis ŝin. En tiu tempo ŝi aĝis same kiel Zorajdo je la momento, kiam ŝia mano estis petata, kaj pro tio Aben' havis avantaĝon de du jaroj.

Por Abdul' Saleh' ĝi estis aparta ĝojo vidi feliĉon de sia fratino. Post unu jaro danke al li ŝi akceptis la decidon de sia patro kiel la plej bonan, kiu eblas por ŝi, kaj dum tiu tempo ŝi iĝis respektbla kaj maturigita virino por geedziĝo. Li sukcesis fari tion per helpo de Rejin' kaj **La Libro Sankta**.

La nupto estis ĉarma. Ĉiuj familianoj de ambaŭ gefianĉoj diris ion belan pri ili, kaj kiam venis la vico de Abdul' Saleh', li staris kaj diris kun granda rideto:

«Por pli aĝa frato estas ago tre grava vidi tion, ke sia fratineteto estas benata de geedziĝo, kiel ŝi forlasas la domon de sia patro kaj ekregas tiun de sia edzo. Mi konis mian fratinton Sanjon kiam mi estis dekjaraĝa. Mi jam rimarkis pri tio, kio estas ĉirkaŭ mi, kaj jam decidis kio estas bona, kio malbona. Mi vidis, ke mia fratino estas bona, juvelo, kiu ornamis mian domon, kvankam ĝis kiam kelkaj jaroj pasis mi ne sciis meti tiun penson en vortojn simplajn. Mi vidis ŝin kreski kaj edukiĝi, lerni kiel regi hejmon, kaj samtempe kreski pri saĝo kaj pacienco. Tial mia fratino ne povis esti por iu ajn. Mi konis Aben' Abdala' antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi akompanis mian patron negoci. Mi scias, ke li estas homo bona, korinklina, firma kaj serioza. Amiko de siaj amikoj, sen malamikoj konsiderindaj, ĉar li estas justa kun tiuj, kiuj estas misfortunaj, kaj tamen estas korinklina al siaj amikoj. Malgraŭ la diferenco pri aĝo ne estas alia viro en la tuta urbo, eble en la tuta mondo, kiun mi povas fidi mian fratinton por ĉiam. Ĉar mi scias, ke li estas korinklina kaj sindonema, pura kaj sencoplina. Aben' Abdala', bonvenigata vi estu en mian familion. Brakumu min, frato!»

Kaj ili ĉirkaŭbrakis unu la alian en komplikon kaj ĝojon de ĉiuj.

Poste Aben' dankis «tiujn elkorajn vortojn», kaj promesis, ke «mi donos La Lunon al Sanj', se ŝi tion necesas, ĉar mi atentos al ŝi la ceterajn tagojn de mia vivo, kaj mi amos kaj respektos ŝin ĝis la morto apartigos nin».

Finfine Sanj' mem devis diri kelkajn vortojn:

«Edzo: mi ne multe povas aldoni al tio, kion vi diris. Mi estas amonta vin dum mia tuta vivo, kaj se mi ne estas sufiĉe bona pri tiu

tasko, kion vi esperas de mi, mi esperas, ke vi diros al mi kaj postulu tion de mi, ĉar mi nun estas via. Gepatroj amataj, mi venos vidi vin ofte, kvankam nun vi scias, ke mi dediĉigas korpanime al mia edzo kaj gefiloj».

Tiam ŝi sidiĝis sur la kusenoj, apud sia edzo. Servantoj venigis manĝaĵojn por festumantaj gastoj.

Dum la festumado, profesiaj mukizistoj kaj dancistinoj ĝojigis la gastojn, kaj tri tagojn poste, kiam la lasta el ili jam estis for, Aben' petis de sia edzino pretigi ilian dormoĉambron por ricevi lin, kaj ŝi faris tion per la maniero kiun sia frato estis instruinte ŝin: unue ŝi kisis liajn manojn kaj modeste iris en la ĉambron per mallongaj paŝoj. Kiam ŝi jam estis tie, ŝi malmetis siajn ŝuojn kaj nudiĝis tute. Poste ŝi malfermis la liton kaj moligis la matracon, por ke ĝi estu plej komforta. Poste ŝi kuŝis kaj atendis sian edzon.

Kiam li venis, li ne esperis trovi sian edzinon tute nuda kuŝante sur la geedza ripozejo.

«Venu, edzo», ŝi diris, dorlotema, kun gesto de mano kaj brako, dum ŝia alia mano ripozas sur sia ventro kaj ŝiaj kruroj estas benditaj kune, turnitaj flanken.

Aben' restis senmova apud la pordo, sed ŝi staris per ĝentila salto kaj ĉirkaŭante lin per brakumo tenera, ŝi kisis lian buŝon kaj komencis nudigi lin dum ŝi diris:

«Edzo, venu, ne estu timema. Ni realigu nian amon, ĉar mi ne sentos min via ĝis kiam mi sentos vin ene de mia sino».

Li lasis ŝin fari ĉion. Ĵus tiel, kiel frato diris al ŝi, Aben' estis tute ignoranta pri virinoj kaj la arto ami, kaj pro tio ŝi devis instrui lin laŭ la scio de Abdul' Saleh' kaj Rejin'. Ŝi kuŝigis lin sur la liton, kaj metante ĉiun genuon flanken de sia edzo, ŝi falis sur la starantan virecon de sia edzo, kio kriigis ŝin pro doloro, eĉ se ŝi atendis ĝin. Prenante la edzan manon, ŝi metis ĝin ĉe ineco sia kaj malsekigis ĝin per sia unua sango, kaj montrante liajn fingrojn makulitajn per la ruĝa likvo, ŝi diris:

«Edzo, estu tiu sango ĵus originita de via fonto de vivo kiel pakto inter ni du por venigi vivon novan al nia hejmo kaj ami ĝin kaj igi ĝin bonaj gefiloj de Dio».

Tion dirinte, ŝi daŭrigis siajn koksajn movojn saĝe kalkulitaj, tiel, kiel ŝi vidis Rejinon fari al sia edzo, ŝia frato, kelkaj fojojn, ĝis kiam ŝi portis sian edzon al seksa paroksismo post malmulte da tempo, malpli ol Rejin' al Abdul', kio estis strange, ĉar sia frato estas multe pli juna ol Aben'. Kaj ŝi estis tre feliĉa scii, ke ŝi jam havas ion de sia

edzo ene de ŝi, eĉ se ŝi ankoraŭ ne sciis ĉu temas pri nova vivo.

Aben' revenis en forton, kaj dum la nokto li prenis ŝin trifoje denove.

«Sed kiel povas virgulino lerni tiom multe pri amarto, edzino», mirigite li demandis.

«Patrino pretigis min efike, edzo, kaj tion, kion ŝi silentis pro prudento, mia bofratino rakontis al mi».

«Ho, dolĉa Rejin'».

Poste li restis brakumante ŝin longe, flarante ŝian hararon, kaj fine li konfesis: «vere mi devas diri, ke mi havas la senton, ke mi jam vivis tion, edzino. Mi neniam estis edzo, sed tiujn lastajn noktojn mi songis pri tio ĉi, esti en lito kun virino simila al vi, aŭ via pli aĝa fratino, ĝuante la plezuron, kiun vi donas al mi».

«Sed, edzo, mi ne havas fratinton, nek pli aĝan nek malpli aĝan, sed nur pli aĝan fraton, Abdul' Saleh'».

«Jes, edzino, mi scias. Tamen mi songis, ke vi havas fratinton kies nomo estas Zorajd'...»

«Zorajd'! Jen bela nomo. Do, se vi tion volas, edzo, mi estos Zorajd' por vi kiam ni estos en intimeco nia».

Aben' kisis ŝin kaj venigis ŝin en orgasmon. Kiam Sanj' venis tien, ŝi kriis tre laŭte, same kiel Zorajd' faris en la songo de Aben'.

Dek monatojn poste ili havis belan bebon, kies nomo estis Zorajd', je la surprizo de Abdul' Saleh'. Tio zorgigis lin, ĉar li kredis, ke tion scias nur Dio, Pro El Fu kaj li.

«Diru, bofrato: kial Zorajd'?»

«Tiel nomiĝis mia mortinta patrino. Mi ĉiam pensis, ke ĝi estas la plej bela nomo, kiu estas, kaj en la tuta urbo neniu nomiĝas tiel, nur mia filino».

Unu jaron poste Sanj' naskis ĝemelojn, kaj fraton denove surprizis tio, ke ili ricevis la nomojn Abdul' kaj Ibrahim'. Kaj kiam du jarojn poste ŝi naskis filinon denove, ŝi eknomiĝis Zalema.

Abdul' Saleh' ankaŭ ne estis pigra, kaj kiam eta Zalema venis en la mondon, ŝi trovis kvin gekuzojn pli aĝaj ol ŝi. Kvin geinfanoj naskitaj de la ventro, kiun Abdul' Saleh' ŝtonigis je sia unua juneco.

Daŭrigota...



Hispana flamenko

Mi atente spektis la paroladojn dum la ekprezidantiĝo de Huanma Moreno, nova gvidanto de PP en Andaluzio, kaj mi devas konstati la altan gradon da demagogio kaj sensenco en hispana politiko. Ŝajnas, ke oni kondamnas ankoraŭ la Gereĝojn Katolikajn pro tio, ke ili forpelis la ciganojn de la regno, kaj sekve flamenko ne estas nia arto tradicia, laŭ Teresa Rodríguez...

Sed se ŝi scius pri tio, kion ŝi priparolas, ŝi komprenus, ke arta flamenko jam estis en Hispanio antaŭ ol ciganoj venis, eble el la tempo de Tartessos, antaŭ kelkaj miloj da jaroj, kiel kelkaj reserĉistoj defendas hodiaŭ. Sed estas alia argumento pli evidenta: **kial ciganoj de aliaj landoj ne kantas, ludas aŭ dancas flamenkon?** Flamenka arto estas hispana, ne cigana, kvankam ciganoj okupas sin pri tiu arto tre efike.

Bedaŭrinde, ne nur estis ciganoj, sed ankaŭ judoj forpelitaj el Hispanio, kaj Anglio (pli frue), Francio, Italio, kvankam je 1492 **judojn, ne ciganojn**, forpelis la Katolikaj Gereĝoj, ĉar ili ne akceptis kristanismon kiel religion. Sekve oni forpelis religion, ne homojn, pro politikaj kialoj. Sed tio neniel rilatas al kulturo aŭ flamenko. Tia arto, laŭ mi, ne bezonas apartan protekton, same kiel taŭroludo, sed atakojn certe ili ne bezonas. En nia lando maldekstruloj ŝajnas pensi, ke nur ili pravos, kaj iliaj ideoj estas la solaj meritoplenaj, ĉar ne vane ili malvenkis la militon je 1939. Bedaŭrinde ili denove atakas la manieron esti de hispanoj kaj de Hispanio, kaj kiam venas partio, kiu defendas tiujn, maldekstruloj timas, ke denove forto de racio venkos ilin. Oni ne povas ataki kaj ne esperi esti atakata kaj, plej verŝajne, venkata.

Ĉapitro 51^a

Ĉu la profetoj de la subtera templo de Sfinkso vidis la novan monarĥon de Egipto apud la piramidoj; ĉu ili sciigis tiun al la reĝa palaco kaj kiel? oni ne scias. Sed kiam Ramzes estis proksimiĝanta al la rivero, la respektinda ĉefpastro Herhor ordonis vekti la palacajn servistojn, kaj kiam la sinjoro estis sur Nilo, ĉiuj pastroj, generaloj kaj civilaj altranguloj jam kolektiĝis en la granda salono.

Ĉe la leviĝo de l' suno Ramzes en la fronto de la malgranda taĉmento enrajdis en la palacan korton, kie la servistoj falis antaŭ li sur la vizaĝojn, kaj la gvardio levis la glavojn ĉe la sono de trumpetoj kaj tamburoj.

Salutinte la armeon, lia sankteco iris en la banejon kaj banis sin en parfumita akvo. Poste li permesis ordigi siajn diajn harojn; kiam la frizisto demandis lin plej humile, ĉu li ordonas razi la kapon kaj barbon, la estro respondis:

—Superflue. Mi ne estas pastro, sed soldato.

Post momento ĉi tiuj vortoj transiris en la aŭdiencan salonon, post unu horo trakuris la palacon, tagmeze ili jam estis disportitaj en la tuta Memfiso, kaj vespere estis jam konataj en ĉiuj temploj de la ŝtato, de Tami-nhor kaj Sabne-Hetam norde ĝis Suunu kaj Pilak sude.

Aŭdante la novaĵon, la nomarĥoj, nobeluloj, soldatoj, popolo kaj eksterlanduloj freneziĝis de ĝojo, sed



la sankta pastraro tiom pli fervore funebris la mortintan faraonon.

Elirinte el la banejo, lia sankteco surmetis mallongan ĉemizon kun nigraj kaj flavaj strioj, sur ĝin flavan brustŝirmilon, sur la piedojn sandalojn, ligitajn per rimenoj, kaj sur la kapon kaskon kun pinto. Poste li alligis ŝtalan asirian glavon, kiun li portis en la batalo apud Sodaj Lagoj, kaj ĉirkaŭita de granda sekvantaro de generaloj, kun bruoj kaj tinto eniris en la aŭdiencan salonon.

Tie iris renkonte al li la ĉefpastro Herhor, akompanata de la sanktaj ĉefpastroj Sem, Mefres kaj aliaj. Ilin

sekvis: la grandaj juĝistoj de Memfiso kaj Teboj, dekelko da najbaraj nomarĥoj, granda kasisto, kaj la superaj intendantoj de la domoj: de greno, brutoj, vestoj, sklavoĵoj, oro kaj arĝento, kaj multaj aliaj altranguloj.

Herhor sin klinis antaŭ Ramzes kaj diris kortuŝita:

—Sinjoro! Al eterne vivanta via patro plaĉis foriri al la dioj, kie li ĝuas la eternan feliĉon. Sur vin hodiaŭ falas la devo zorgi pri la orfa ŝtato. Saluton do al vi, sinjoro kaj estro de la mondo, kaj vivu eterne lia sankteco la faraono Ĥam-sam-merer-amen-Ramesses-neter-hog-an!...

La ĉeestantoj kun entuziasmo ripetis la ekkrion. Oni supozis, ke la nova estro montros emocion aŭ embarason. Sed je la ĝenerala mirego, la sinjoro nur sulkigis la brovojn kaj respondis:

—Konforme al la volo de mia patro kaj al la leĝoj de Egipto mi prenas en miajn manojn la regadon kaj mi estos por la gloro de la ŝtato kaj por la feliĉo de la popolo...

Subite la sinjoro sin turnis al Herhor kaj fikse rigardante liajn okulojn, demandis:

—Sur la tiaro de via ekscelenco mi vidas la oran serpenton. Kial vi surmetis la simbolon de la reĝa povo?

Morta silento ekregis en la kunveno. La plej maltima homo en Egipto supozus neniam, ke la juna sinjoro komencos la regadon per tia demando al la plej potenca persono en la tuta regno, eble pli potenca ol la mortinta faraono.

Sed post la juna sinjoro staris dekelko da generaloj, en la korto

brilis la sentimaj regimentoj de la gvardio, kaj Nilon jam estis transiranta la armeo de Sodaj Lagoj, ebria de la triumfo, amanta sian ĉefon.

La potenca Herhor paliĝis kiel vakso kaj ne povis eligi voĉon el la kunpremita laringo.

—Mi demandas vian ekscelencon —trankvile ripetis la faraono —je kia rajto sur via tiaro estas la reĝa serpento?

—Tio estas la tiaro de via avo, la sankta Amenhotep —mallaŭte respondis Herhor. —La plej alta kolegio ordonis al mi surmeti ĝin en gravaj cirkonstancoj.


—Mia sankta avo —diris la faraono —estis la patro de la reĝino kaj kiel favoron li ricevis la rajton ornami sian tiaron per la ureus. Sed, kiel mi scias, lia ceremonia vesto troviĝas inter la relikvoj de la templo de Amon.

Herhor jam ekregis sin mem.

—Bonvolu rememori, via sankteco —klarigis li —ke tutan tagon Egipto restis sen estro. Iu ja devis vekti kaj kuŝigi la dion, Ozirison, doni benojn al la popolo kaj honori la reĝajn antaŭulojn. Por tiel malfacila momento la plej alta kolegio ordonis al mi surmeti la sanktan relikvon, por ke ne malfruŭ la regado de l' ŝtato kaj la servado al la dioj. Sed nun, kiam ni havas rajtan kaj potencan estron, mi demetas la miraklan relikvon...

Dirinte ĉi tion, Herhor demetis de la kapo la tiaron, ornamitan per la ureus, kaj transdonis ĝin al la ĉefpastro Mefres.

La minaca vizaĝo de l' faraono sereniĝis kaj li direktis siajn paŝojn al la trono.



Subite la sankta Mefres baris al li la vojon kaj sin klininte al la tero, diris:

—Bonvolu, sankta sinjoro, aŭskulti plej humilan peton...

Oni ne vidis humilecon en lia voĉo, nek en la okuloj, kiam rektiĝinte li daŭrigis:

—Jen estas la vortoj de la plej alta kolegio de ĉiuj ĉefpastroj...

—Diru —respondis la faraono.

—Via sankteco scias —daŭrigis Mefres —ke faraono, kiu ne posedas ĉefpastrajn sanktigojn, ne povas fari la plej altajn oferojn, nek vesti kaj senvestigi la miraklan Ozirison.

—Mi komprenas —interrompis la sinjoro. —Mi estas faraono, kiu ne posedas la rangon de ĉefpastro.

—Kaj tial —daŭrigis Mefres —la plej

alta kolegio humile petas vian sanktecon, ke vi bonvolu elekti ĉefpastron, kiu povus anstataŭi vin en la plenumado de la religiaj ceremonioj.

Aŭskultante la kategorian paroladon, la ĉefpastroj kaj civilaj altranguloj tremis kaj maltrankvile moviĝis, la generaloj kvazaŭ nevole ordigis la glavojn. Sed la sankta Mefres rigardis ilin kun nekaŝata malestimo kaj ree fiksas siajn malvarmajn okulojn sur la vizaĝo de la faraono.

Sed ankaŭ nun la sinjoro de l' mondo ne estis embarasita.

—Bone —respondis li —ke via ekscelenco rememorigis al mi la gravan devon. La milita metio kaj la aferoj de l' ŝtato ne permesos al mi plenumi la ceremoniojn de nia sankta religio, mi do devas elekti por ili anstataŭanton...

Dirante tion, la sinjoro komencis ĉirkaŭrigardi en la ĉambro. Maldekstre de Herhor staris la sankta Sem. La faraono fikse rigardis lian kvietan kaj honestan vizaĝon kaj subite demandis:

—Kiu kaj kio vi estas, ekscelenco?

—Mia nomo estas Sem, mi estas ĉefpastro de la templo de Ptah en Pi-Bastis.

—Vi estos mia anstataŭanto en la religiaj devoj —diris la sinjoro, montrante lin per la fingro.

Murmureto de admiro traflugis inter la ĉeestantoj. Eĉ post plej longa konsiderado kaj interkonsiliĝoj malfacile estus elekti pli indan pastron por tiel alta posteno.

Herhor paliĝis ankoraŭ pli forte, kaj Mefres kumpremis la bluajn lipojn kaj duone kovris la okulojn per la palpebroj.

Post momento la nova monarĥo sidiĝis sur la trono, kiu anstataŭ piedoj havis skulptitajn figurojn de reĝoj kaj princoj de naŭ popoloj.

Baldaŭ Herhor, sur ora plado, donis al la sinjoro blankan kaj ruĝan kronon, ĉirkaŭitan de ora serpento. La faraono silente metis ĝin sur la kapon, kaj la ĉeestantoj falis sur la vizaĝojn.

Tio ne estis ankoraŭ la solena kronado, sed nur akcepto de la povo.

Kiam la pastroj estis incensintaj la faraonon kaj kantintaj himnon al Oziriso, ke li verŝu sur lin ĉiujn benojn, oni permesis al la civilaj kaj militistaj altranguloj kisi la malsupran ŝtupon de l' trono. Poste la sinjoro prenis oran kuleron kaj, ripetante la preĝojn, kiujn voĉe diris la sankta Sem, li incensis la statuojn de l' dioj, kiuj staris en du vicoj, ĉe ambaŭ flankoj de lia reĝa seĝo.

- Kion mi devas fari nun?
—demandis la monarĥo.
- Vin montri al la popolo
—respondis Herhor.

Tra orumita, larĝe malfermita pordo kaj tra marmora ŝtuparo lia sankteco eniris sur la terason, kaj levinte la manojn, li turnis sin al la kvar partoj de la mondo. Eksonis trumpetoj kaj sur la supro de l' pilonoj oni pendigis flagojn. Kiu ajn estis sur la kampo, en la korto aŭ en la strato, falis sur la vizaĝon; la bastono, levita super la dorso de l' bruto aŭ sklavo, malleviĝis, kaj ĉiuj ŝtataj krimuloj, kondamnitaj en tiu ĉi tago, ricevis pardonon.

Revenante de la teraso, la monarĥo diris:

- Kion ankoraŭ mi devas fari?
- Atendas vian sanktecon la manĝo

kaj la ŝtataj aferoj —diris Herhor.

—Mi do povas ripozi —respondis la faraono. —Kie estas la restaĵoj de mia sankta patro?

—Oni transdonis ilin al la enbalzamigistoj —murmuretis Herhor.

La okuloj de la faraono pleniĝis per larmoj kaj la lipoj ekstremitis. Sed tuj li ekregis sin kaj silente rigardis la plankon. Estus nekonvene, se la servistoj vidus la emociion de tiel potenca sinjoro. Volante turni la atenton de l' sinjoro al alia temo, Herhor diris:

- Ĉu via sankteco bonvolos akcepti la respekton de la reĝino patrino?
- Mi?... mi devas akcepti la respekton de mia patrino?...
—demandis la faraono per sufokita voĉo.

Kaj volante nepre trankviliĝi, li aldonis kun rideto

- Via ekscelenco forgesis, kion diris la saĝulo Eney?... Eble la sankta Sem ripetos al ni liajn belajn vortojn...
- "Memoru —citis Sem —ke ŝi naskis vin kaj nutris per ĉiuj rimedoj..."
- Daŭrigu... daŭrigu!... —insistis la sinjoro, penante ekregi sin.
- "Se vi forgesus pri tio, ŝi levos siajn manojn al la dio, kaj li favore aŭskultos ŝian plendon. Ŝi longe portis vin sub ŝia koro, kiel grandan ŝarĝon, kaj naskis vin, kiam pasis viaj monatoj. Poste ŝi portis vin sur la dorso kaj dum tri jaroj metis sian mamon en vian buŝon. Tiel ŝi edukis vin, ne sentante abomenon al via malpureco. Kaj kiam vi iris en la lernejon kaj oni ekzercis vin en la skriboj, ĉiutage ŝi stariĝis antaŭ via instruisto kun pano kaj biero de

sia domo." [Aŭtentika]

La faraono profunde eksopiris kaj diris pli trankvile:

—Vi do vidas, ke ne konvenas, ke mia patrino salutis min. Mi, mi devas iri al ŝi...

Kaj li trapasis longan vicon de salonoj, kies muroj estis kovritaj per marmoro, alabastro kaj ligno; hele kolorigitaj, skulptitaj kaj orumitaj, kaj post li lia grandega sekvantaro. Proksimiĝinte al la antaŭĉambro de l' patrino, li faris signon, ke oni lasu lin sola.

Li trairis la antaŭĉambron, momenton haltis antaŭ la pordo, poste li ekfrapis kaj mallaŭte eniris.

En la ĉambro kun nudaj muroj, en kiu anstataŭ mebloj estis simpla lito kaj breĉita kruĉo kun akvo, ĉio kiel signo de l' funebro, sidis sur ŝtono la patrino de l' monarĥo, la reĝino Nikotris. Ŝi estis nudpieda, en dika ĉemizo; ŝia frunto estis malpurigita per nila koto, ŝi havis cindron en la implikitaj haroj.

Ekvidinte Ramzeson, la respektinda sinjorino kliniĝis, por fali al liaj piedoj. Sed la filo kaptis ŝin inter siajn brakojn kaj diris kun ploro:

—Se vi, patrino, vin klinas antaŭ mi ĝis la tero, mi antaŭ vi devos malleviĝi sub la teron...

La reĝino karese premis lian kapon al sia brusto, viŝis al li la larmojn per la maniko de sia dika ĉemizo, kaj levinte la manojn supren murmuretis:

—Ĉirkaŭu ĉiuj dioj... la spiritoj de via patro kaj avo ĉirkaŭu vin per siaj zorgoj kaj benoj... Ho Izido, neniam mi avaris al vi oferojn, sed hodiaŭ mi donas la plej grandan... Mi donas al vi mian amatan filon...

Ĉi tiu mia reĝa filo fariĝu sendivida via filo, kaj liaj gloro kaj potenco pligrandigu vian dian heredaĵon...

La sinjoro multfoje ĉirkaŭprenis kaj kisis la reĝinon, fine li sidigis ŝin sur la lito, kaj li mem sidiĝis sur la ŝtono.

—Ĉu la patro lasis al mi ordonojn? —demandis li.

—Li nur petis, ke vi ne forgesu lin, kaj al la plej alta kolegio li diris la jenajn vortojn: "Mi lasas al vi posteulon, kiu estas leono kaj aglo en unu persono; obeu lin, kaj li levos Egipton al potenco senlima."

—Ĉu vi pensas, ke la pastroj obeos al mi?

—Memoru —diris la patrino —ke la emblemo de l' faraono estas la serpento. Kaj la serpento estas saĝo, kiu silentas kaj mordas morte en neatendita momento... Se vi prenos la tempon kiel liganon, vi venkos ĉion.

—Herhor estas terure maltima... Hodiaŭ li kuraĝis surmeti la tiaron de la sankta Amenhotep... Kompreneble mi ordonis al li demeti ĝin, kaj mi forigos lin de la regado... Lin kaj kelkajn anojn de la plej alta kolegio...

La reĝino ekskuis la kapon.

—Egipto estas via —diris ŝi, —kaj la dioj donis al vi grandan saĝon. Sen tio mi terure timus malkonsenton kun Herhor...

—Mi ne malkonsentas kun li, mi lin forpelas.

—Egipto estas via —ripetis la patrino —sed mi timas la batalon kontraŭ la pastroj. Vere, via patro, tro malsevera, kuraĝigis ĉi tiujn homojn, sed oni ne devas alkonduki ilin al la malespero per la severeco. Cetere, pripensu: kiu anstataŭas al vi ilian konsilon?... Ili scias ĉion, kio estis, estas kaj

estos sur la tero kaj ĉielo; ili vidas la plej kaŝitajn homajn pensojn kaj direktas la korojn, kiel la vento la foliojn. Sen ili vi ne nur ne scios, kio okazas en Tiro kaj Ninivo, sed eĉ en Memfiso kaj Teboj.

- Mi ne forpuŝas la saĝon, sed mi volas la obeon —respondis la faraono. —Mi scias, ke ilia saĝo estas granda, sed ĝi devas esti kontrolata kaj direktata, por ke ĝi ne ruinigu la ŝtaton... Diru vi mem, patrino: kion dum tridek jaroj ili faris el Egipto?... La popolo suferas mizeron aŭ ribelas, ni havas malmulte da soldatoj, la trezorejo estas malplena, kaj dume, kelke da monatoj de ni, kvazaŭ ŝvelanta kuko kreskas Asirio kaj jam hodiaŭ trudas al ni traktatojn!...
- Faru, kiel vi volas. Sed memoru, ke la emblemo de l' faraono estas la serpento, kaj la serpento estas la silento kaj saĝo.
- Vi diras la veron, patrino; sed

kredu al mi, ke ifoje la kuraĝo valoras pli multe ol la prudento. Jam hodiaŭ mi scias, ke la pastroj intencis tutajn jarojn konduki la militon kontraŭ Libio. Mi finis ĝin en la daŭro de dekelko da tagoj kaj nur tial, ke ĉiutage mi faris ian paŝon frenezan, sed decidan. Se mi ne estus kurinta renkonte al ili en la dezerton, kio ja estis granda malprudento, hodiaŭ ni havus Libianojn apud Memfiso...

- Mi scias, vi persekutis Tehennan, kaj Tifono surprizis vin —diris la reĝino. —Ho senkonsidera infano... vi ne pensis pri mi!

La sinjoro ekridetis.

- Estu trankvila via koro —respondis li. —Kiam la faraono batalas, ĉe lia dekstra kaj maldekstra mano stariĝas Amon. Kaj kiu egalas lin?...

Ankoraŭ unu fojon li ĉirkaŭprenis la patrinon kaj foriris.





Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj*



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels102.pdf>

ISSN 1886-1997 (Reta versio)

ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88